Esperanto servu pacon!

A K T U A L E

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

La agadjaro 1976/77 №7(40) Marto

## POR KIU EKZISTAS LA FAKOJ KAJ SERVOJ?

La respondo estas konata: por SEJM-anoj. Por tiuj, kiuj vidas en Esperanto utilan objekton, uzeblan en plej diversaj direktoj de homa agado. Mi ne graros, se diros: "Por vi, karaj legantoj!", sed ne nur por vi - ankaŭ por viaj kluboj, grupoj, sekcioj.

En SEJM funkcias 15 fakoj kaj servoj , tion ĉi vi scias. La taskoj, plenumataj de ĉiu fako, estas allogaj kaj interesaj diversskale, kaj pro tio ili havas adekvatajn kvantojn de la kunlaborantoj. Unu fako povas havi kelkajn dekojn da kunlaborantaj geesperantistoj (ekz. scienc-teknika, kolektanta), la aliaj - po kelkajn. Kaj iuj servoj eĉ ĝenerale ne havas helpantojn! Ĉu tio ĉi estas normala situacio? Mi diros, ke ne! Ĉar foresto de kunlaborantoj povas esti klarigata nur per du ĉefaj kaŭzoj: neaktiveco ĉi-flanke de la fakestro kaj neaktiveco de la amaso. Dume ni ne tuŝu niajn fakestrojn - sufiĉas zorgoj por ili. Sed kiel allogi la esperantistaron al laboro de la fakoj kaj servoj? "Devas pli aktive varbi la fakestro" - diros vi. Jes, vi pravas, sed nur duone.

Mi turnas min al gvidantoj de SEJM-kluboj, al SEJM-subtenantoj, kaj certe al la fakestroj - ni faru tiel:

1. En ĉiu klubo la gvidanto elektu por ĉiu fako (servo) de SEJM respondeculon, kiu estos "ligilo" inter certa fako (servo) kaj la klubo, subtenante kontaktojn kun la fakestro kaj plenumante (laŭeble) ties direktivojn. Ni komprenu, ke la fakestro devas havi <u>en ĉiu klubo</u> kunlaboranton - respondeculon por ne esti izolita, por ne "kuiriĝi en propra suko". Estu ĉi tiu tasko (indiki kunlaboranton de sia klubo por ĉiu fakestro) nepra por ĉiu gvidanto.

2. Al SEJM-Sekretario necesus agiti la subtenantojn aliĝi al iu ajn fako, ke nepre ĉiu subtenanto estu fakano, por doni veran, ne nur monan utilon al SEJM.

3. Ne ĉiu klubo de SEJM havas pli ol 15 geaktivuloj, jes - vere. Sed ĉu ili ĉiuj okupiĝu nur pri la faka laboro? Aŭ tamen ankaŭ pri la agado de E-klubo surloke? Unue, taskoj (devoj) de la respondeculo neniam povas esti tro malfacilaj kaj temporabaj, sed ambaŭflanke utilaj. Due, ne ĉiu klubo havas bonan strukturon por agi fruktodone kaj kunlabori kun la fakoj, por ke tiu kunlaboro organike eniĝu en la kluban vivon kaj agadon.

Do, E-klubo povas esti organizita sekvamaniere:

1) Prezidanto de la klubo.
2) SEJM-reprezentanto.
3) Sekretario.
4) Fako de propagando (gvidanto) kun subfakoj: a) prelega; b) murgazeta; c) de ekstera informado; ĉ) de montra agitado; d) de MEM-agado (laŭeble).
5) Fako de korespondo (gvidanto): a) servo de interklubaj kontaktoj; b) servo de eksterlanda korespondo; c) subfako de eksterlanda informado.
6) Historia fako (gvidanto) kun subfakoj: a) de kluba kroniko; b) de kluba arkivo; c) de kalendaro de internaciaj datoj ktp.
7) Kultur-amasa fako (gvidanto): a) servo de E-renkontiĝoj; b) Klubo de Interesaj Renkontoj; c) koncerta brigado; ĉ) servo de E-kantoj; d) kolektanta subfako.

8) Instrua fako (gvidanto): a) subfako de metodika laboro; b) servo de E-tradukado; c) scienca subfako; ĉ) biblioteko de la klubo, kluba peranto.

9) Teknika fako (gvidanto): a) foto-kino-lumbilda servo; b) radio-magnetofona servo; c) multobliga servo.

Vi vidas, ke simila sistemo estus oportuna ne nur por gvidado de la klubo, sed ankaŭ por kunlaboro kun la fakoj kaj servoj de SEJM. Certe ĝi povas esti ŝanĝata laŭbezone, kaj certe ĝi ne por ĉiu klubo povas esti oportuna, sed principe ĝi povas esti rekomendita por la kluboj.

Se ekzistas SEJM, kiu havas bonan strukturon, viglan strukturon, laboreman strukturon, do ĉiu SEJM-klubo devas reorganizi sian sistemon de la gvidado, sian strukturon por esti vera SEJM-klubo, kunlaboranta kun la similaj (el organiza vidpunkto) SEJM-kluboj. Ni ja vidas fakte teruran diversecon en organizeco de la kluboj, en ilia gvidado, en ilia struktura konstruo. Ni ne devas toleri tion ĉi!

Vi opinias, ke mi deflankiĝis de la temo? Ne, kara leganto! Se estus tiel, kiel mi permesis al mi "reveti", do tiam la fakoj kaj servoj de SEJM povus eĉ limigi akcepton de la kunlaborantoj. Mi vidas kaŭzon de malsukcesa laboro en la fakoj ne en malbona laboro de la fakestroj, ne en neideala organiza strukturo de SEJM, sed en diversa, ofte nepripensita kaj maloportuna organiza konstruo de la kluboj. Ni kulpas mem, surloke, en niaj "rondoj familiaj", disĵetitaj tra la lando.

Do pensu, karaj gvidantoj, estimataj geaktivuloj! Pensu kaj faru la konkludojn. Sed bonvolu rapidi: la tempo nin ne atendos. Se la fakoj (servoj) kaj la SEJM-kluboj estos utilaj unu al la alia, do la prosperon havos ambaŭ flankoj!

V.Sapoĵnikov, v/p de SEJM pri fakaj aferoj.

## FONDU KLUBAJN INFORMAJN FAKOJN!

Longa estas la historio de informado pri la Internacia Lingvo. Estis tempo, kiam ne ekzistis landaj aŭ aliaj organizaĵoj kaj kiam ĉio dependis de la iniciato de unuopuloj. La informado estis ofte nomata propagando. En kadroj de SEJM la propagandon ĝenerale surprenis gvidantoj de kluboj aŭ grupoj, sed iu koordina organo forestis. (Tamen en 1969 - 1973 SEJM havis vicprezidanton pri propagandaj aferoj. - La red.) En 1976 dum la 10-a Konferenco de SEJM-Konsilantaro estis fondita Propaganda fako, kies tasko estas: kolekti informajn materialojn pri la Internacia Lingvo kaj kompili materialojn por vere necesa artikolaro "Gvidlibro de aktivulo", kie enestos diversspecaj konsilaj artikoloj pri organizo de kluba vivo, pri altkvalita informado, pri aranĝo de ekspozicioj, koncizaj historiaj materialoj ktp.

Laboron de Propaganda fako oni ne devas kompreni kiel nur kompiladon de propagandiloj. Propaganda fako de SEJM devas esti centra organo de ĉiuj respondeculoj surloke, ĝi devas gvidi ilian laboron, helpi eviti erarojn en la informado kaj zorgi pri ideologia laboro en la kluboj. Klubo, grupo, rondeto jam estas kolektivo. Tie vigle ondas diversaj torentoj de la vivo: instruado de la lingvo, solvado de organizaj demandoj, laboro per kaj por disvastigo de nia kara lingvo, edukado de la klubanoj. Antaŭ ĉio la kluboj de SEJM devas eduki siajn membrojn en spirito de la proleta internaciismo. Ni devas starigi ĉi tiun demandon en unu el plej ĉefaj lokoj.

Ĝis nun en niaj kluboj (krom kelkaj) ne estis elektitaj homoj, kiuj speciale respondecus pri la informado. Tasko de ĉiu klubestro estas trovi homon en sia kolektivo, kiu gvidos ĉi tiun laboron, kiu organizos ĉirkaŭ si grupon de helpantoj kaj saĝe, vaste kaj konstante liveros al neesperantista publiko informojn pri Esperanto.

Propaganda fako de SEJM alvokas ĉiujn klubestrojn fondi klubajn propagandajn fakojn, kiuj kunlaborante povos levi la nivelon de pri-esperanta informado landskale. Post elektado de ĉiuj respondeculoj en "Aktuale" aperos ilia listo; en la regionoj estos fonditaj est-raj grupoj, kiuj koordinos la propagandan laboron surloke. Ĉefaj di-rektoj de ĉi tiu laboro estas: 1) informado per prelegoj; 2) infor-mado pere de gazetaro; 3) informado pere de radio kaj televido; 4) instruado de informaj manieroj al ĉiuj klubanoj; 5) organizo de eks-pozicioj; 6) fondo (se ankoraŭ en la klubo ne ekzistas) de murgaze-to, standoj kaj fotoalbumoj; 7) fondo de lumbilda kaj magnetofona fondusoj de la klubo.

Dufoje dum jaro oni organizos aŭ seminarion de propagandistoj (dum regionaj renkontiĝoj), aŭ perleteran raportadon pri farita la-boro, pri malfacilaĵoj kaj eraroj, pri kiuj metodikan helpon ĉiuj povos ricevi de plej spertaj niaj aktivuloj. Antaŭ ol estos eldoni-ta la "Gvidlibro", en "Aktuale" aperos serio de artikoloj, kiuj hel-pos al lokaj propagandistoj eviti erarojn.

Dum organizo de propaganda laboro ni devas scii, kiel ĉi-direkte agis kaj agas ekzemple UEA. En 1949 ĝi refondis sian propagandan fakon, kaj jam en 1950 dum Universala Kongreso en Parizo transfor-mis ĝin en Informan fakon. Samjare ekfunkciis Internacia Gazetara servo kun la celo liveradi taŭgajn kaj aktualajn informojn al pres-agentejoj kaj al la landaj asocioj. En la sama jaro 1950 por la unua fojo funkciis ankaŭ la Kongresa Gazetara servo. Sekvis reorga-nizado kaj fondo de la landaj informaj fakoj.

En 1956 en Frostavallen (Svedujo) okazis kunveno de reprezentan-toj de la landaj informaj fakoj. La rezulto de ĉi tiu kunveno estis formulita en la dokumento "Fundamenta principaro de informado pri la Internacia Lingvo", kiu konsistas el 9 ĉapitroj kun 21 paragra-foj. Ĝi devas esti plej atente trastudita de ĉiu kluba informa fako kaj ĝenerale de ĉiuj, kiuj deziras efike kaj celtrafe helpi al dis-vastigo de la Internacia Lingvo per kiu ajn rimedo de informado. La "Principaro de Frostavallen" aperos en la "Gvidlibro".

Ĉiu estro de kluba propaganda fako estu unua helpanto de la klubestro, li devas firme kunlabori kun ĉiuj fakoj de SEJM (por tio ja ili ja estas fonditaj).

Dume tasko de klubaj prezidantoj estas fondi surloke propagan-dajn fakojn, elekti indajn respondeculojn kaj sendi iliajn adresojn kun skiza raporto pri sperto de la klubo en informa laboro al mi (226050 Riga-50, p/k 45, Latva SSR). La ricevota materialo estos prilaborita kaj prezentita sur paĝoj de "Aktuale".

Ek al la laboro!

A.Medinŝ, estro de Propaganda fako.

## TAŬGA PROPONO. KIO PLU?

Mi kun plezuro tralegis la artikolon de B.Anoĥin (Ustj-Kameno-gorsk) en "A"-6(39). Lia propono eldoni priesperantan opiniaron de famuloj estas bona, ĝustatempa. Certe la komitatanoj pridiskutos ĉi tiun demandon, kiam la libreto estos sufiĉe preta ĉe iu el la kont-ribuontoj. Mi scias, ke pri kolektado de la eldiroj okupiĝas alme-naŭ kelkaj homoj el diversaj lokoj: V.Noĉovkin (Poltava), A.Rogov (Ĥmelnickij), I.Taskina (Krasnojarsk) kaj aliaj, kiujn mi ne konas.

Tamen ne tion mi volus diri en mia artikoleto. Mi volus turni la atenton de Propaganda fako de SEJM al la fakto, ke aperas simi-laj alvokoj, proponoj kaj pensoj. Tio ĉi signifas, ke estraro de PF dume ne sukcesas rapide orientiĝi kaj ne disvolvas laboron de la fako en necesa grado. Oni devas nepre plani eldonadon de simila propaganda literaturo enkadre de SEJM. Ne nur la "opiniaron", sed ankaŭ la kajerojn de PF, kun plej interesaj propagandaj materialoj - en tiu lingvo, en kiu ili aperis. Ni ja ne vane paroladis dum la

Konferenco pri trea bezono de tiaj kolektoj! Do ili devas esti oftaj kaj distribuataj same kiel "Jarlibro de SEJM" - por ĉiu SEJM-klubo, por ĉiu subtenanto. Nur tiel ni povos altnivele instrui SEJM-anojn pri la propagando. Ni ĉiuj atendas, ke informaj, problemaj kaj organizaj artikoloj de PF-estro aperados regule sur paĝoj de "A", ja tio ĉi estas aktuala!

Ankoraŭ unu rimarko: ne estas eldonata ruslingva aldono al "Aktuale" (propaganda, por diversaj instancoj). Kiu kulpas? (Post fondo de Propaganda fako, aperigo de tia folieto estas ties evidenta tasko. - La red.) Ni ne serĉadu la kulpantojn, sed trovu homon, kiu povus esti redaktoro de ĉi tiu aldono kaj samofte kiel "A" aperigus ĝin, plenigante per riĉa solida enhavo. Interalie, la sama persono povus esti la redaktoro de la propagandaj kolektoj.

Verŝajne, la proponoj, prezentitaj ĉi tie, estas aferoj solvendaj en la Komitato. Tamen mi opinias, ke intereso al ĉitiuj problemoj estas komuna por ĉiuj SEJM-anoj.

V.Sapoĵnikov, komitatano de SEJM.

## I N F O R M I L O №1
## pri la 19-a Okcident-Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (OkSEJT-19)

La Tendaro kaj la Konferenco estas dediĉitaj al la 60-jara datreveno de la Granda Oktobra socialisma revolucio.

Loko: OkSEJT-19 kaj la 11-a Konferenco de SEJM-Konsilantaro okazos en la ukrainia urbo POLTAVO - en turista bazo apud la rivero Vorskla (proksime de la fervoja stacidomo Poltavo-Suda).

Tempo: OkSEJT-19 okazos la 5-an - 14-an de aŭgusto 1977. La 11-a Konferenco de SEJM-Konsilantaro okazos la 15-an - 19-an de aŭgusto 1977.

Programo: La programo de OkSEJT-19 enhavos E-instruadon sur ĉiuj niveloj (paroligaj grupoj, E-Universitato, tradukista kurso, pedagogia seminario). Krome okazos kunveno dediĉita al la 60-jara datreveno de Granda Oktobro, labortago por la Pacfonduso, prelegoj, koncertoj, ekskursoj tra la urbo, Neptun-festo, Konkurso de gajaj kaj spritaj (KGS) kaj aliaj programeroj.

Kondiĉoj: Partoprenontoj de OkSEJT-19 kaj de la Konferenco loĝos en komfortaj 3-litaj ĉambroj en komunloĝejo de hotela tipo. Manĝado - en loka manĝejo. La kvanto de lokoj estas limigita: nur 250 por la tendara periodo kaj 200 por la konferenca. Al pliaj, kiuj ankaŭ ekdeziros veni, ni ne garantias loĝadon kaj manĝadon (pri tio ili zorgu mem).

Kotizo: Kiel kutime, ĝi estas duparta -

a) aliĝkotizo (por poŝtelspezoj, emblemo, insigno ktp) estas: 4 (kvar) rubloj por lernantoj, 5(kvin) rubloj por studentoj, 6 (ses) rubloj por la ceteraj;

b) partoprenkotizo por ĉiu partoprentago estas 4 (kvar) rubloj, ĝi inkluzivas 3-fojan manĝadon (2 rub. 50 kop.) kaj loĝadon ( 1 rub. 50 kop.).

Eblas aliĝi nur por la 10 tendaraj tagoj, por la 5 konferencaj aŭ por ambaŭ periodoj. Venontoj por neplena periodo pagu por la plena aŭ zorgu mem pri loĝado kaj manĝado. La aliĝintoj, kiuj ne sukcesos veni, ricevos la parton "b" de la sendita kotizo.

Adreso: La kotizojn kaj la aliĝilojn bonvolu sendi n e p r e p o ŝ t g r u p e (escepte unuopulojn!) al Grigorenko Vasilij Vasiljeviĉ: 314028 Ukr. SSR, POLTAVO-28, do vostrebovanija. La aliĝiloj kaj la kotizoj estas akceptataj ĝis la 31-a de majo 1977. La kotizoj kaj la aliĝiloj, senditaj post la menciita dato, estos resendataj.

Tendara Komisiono.

# INFORMILO N-o 1
## pri la 19-a Orient-Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (OrSEJT-19)

La Tendaro estas dediĉita al la 60-jara jubileo de la Granda Oktobra socialisma revolucio.

Loko: OrSEJT-19 okazos en la Ĉeljabinska regiono (ĉ. 100 km de Ĉeljabinsk), sufiĉe proksime de la urbo Miass. La antaŭtendara Paroliga periodo ankaŭ okazos apud la urbo Miass.

Tempo: La Paroliga periodo okazos la 1-an - 3-an de aŭgusto 1977. La tendaro okazos la 4-an - 10-an de aŭgusto 1977.

Programo: La programo de OrSEJT-19 neprečenhavos Esperanto-instruadon sur ĉiuj niveloj. Krome okazos mitingo honore al pereintoj por la Soveta potenco, prelegoj, belartaj konkursoj, ekskursoj, festoj kaj aliaj interesaj kaj agrablaj programeroj.

Kondiĉoj: Partoprenontoj de la Paroliga periodo loĝos en kutimaj turistaj kondiĉoj (porteblaj tendoj, dormosakoj, komuna kaldrono...). Loĝado dum la tendara periodo - en netransporteblaj tendoj, manĝado - en la tendara manĝejo.

Partoprenrajto: La Paroligan periodon kaj la tendaron rajtas partopreni anoj de SEJM-kluboj aŭ subtenantaj kluboj, krome - aliaj esperantistoj en aĝo ĝis 40 jaroj. Ĉiuj aliĝantoj devas esti parolkapablaj esperantistoj kaj nepre havi rekomendon de SEJM-Konsilantarano (esceptokaze klubestro). La kluboj plene respondecas pri la lingva nivelo kaj disciplino de la rekomenditoj. Senrekomende rajtas veni individuaj subtenantoj de SEJM kaj personoj invititaj de la SEJM-Komitato.

Kotizo: Kiel kutime, ĝi estas duparta - a) aliĝkotizo (por organizaj elspezoj): 4 rubloj por lernantoj, 5 rubloj por studentoj, 6 rubloj por la ceteraj; b) partoprenkotizo (manĝaĵo, litaĵoj ktp): 4 (kvar) rubloj por ĉiu partoprentago. Veno por neplena tendara periodo estas ebla, sed nedezirinda. La nevenintoj, kiuj frue avertos, rericevos la parton "b" de la sendita kotizo.

Adreso: La kotizojn kaj la aliĝilojn sendu laŭeble pogrupe al: 456304 Miass Ĉeljabinskoj obl., pr. Avtozavodcev 24 - 34, Koptjagina Tatjana Aleksandrovna. Ĉiujn informojn petu de la sama persono. La aliĝiloj kaj la kotizoj estas akceptataj nur ĝis la 15-a de majo. Prokrasto ne estas allasebla.

Tendara Komisiono.

## TENDARAJ LABOROJ

La Tendara Komisiono de OrSEJT-19 serĉas volontulojn por okupi vakantajn postenojn en la tendaro el la sube prezentata listo.

1. Belarta konkurso (gvidantoj kaj ĵurianoj).
2. Dancvesperoj (gvidanto).
3. Deĵorestro.
4. Ekspozicioj (organizanto).
5. Elekto de "Miss kaj Mister Esperanto" (organizanto).
6. E-Universitato (rektoro, prelegontoj).
7. Fotoservo (gvidanto).
8. Fakaj kunvenoj (gvidantoj).
9. Gimnastiko matena (gvidanto).
10. Interpretista konkurso (organizanto, ĵurianoj).
11. Ilustra grupo (desegnistoj).
12. Kantoj (instruantoj).
13. Krokodilĉaso (gvidanto).
14. KGS (organizantoj).
15. Kuracisto.
16. Legejo (estro).
17. Ludoj societaj (organizantoj).
18. Lumbilda vespero (organizanto).

19. Magnetofona servo (gvidanto).
20. Murgazeto (redaktoro).
21. Naskiĝintoj-festo (organizantoj).
22. Neptun-festo (organizantoj).
23. Rida vespero (gvidantoj).
24. Provizestro.
25. Sportaj konkursoj (organizantoj).
26. Statistiko tendara (estro).
27. Tendara butiko (estro).
28. Tradukista kurso (gvidanto).
29. Turistaj grupoj de Paroliga periodo (grupestroj).
30. Ceteraj laboroj laŭ bezono kaj deziro.

DE LA REDAKCIO: La organizantoj de OkSEJT ne aldonis liston de tendaraj laboroj al sia Informilo N-1, sed ĝi evidente koincidas ĉeftrajte kun tiu de OrSEJT. Ankaŭ la partoprenrajto por OkSEJT, prisilentata en ties Informilo, devas esti la sama kiel por OrSEJT - konforme al la Regularo de SEJT. Pri partoprenrajto en la Konferenco vidu en "A"-4(37), p.41.

"LIRO-76"

La 12-an - 13-an de decembro 1976 en Miass okazis jam tradicia Zamenhof-festo, en kiu partoprenis pli ol 70 junaj geesperantistoj (inter ili - gastoj el Ufa, Ĉeljabinsk, Magnitogorsk). Du tagoj de restado en la komfortega ripozbazo "Rassvet", situanta en pitoreska pina arbaro ĉe la lago Ĉebarkulj; solena malfermo de la festo, horo de interkonatiĝo, gaja vespero kun koncerto, ludoj, kantoj, dancoj - ĉio ĉi lasis la plej bonajn impresojn en memoro de la partoprenintoj. Tamen aparte temos pri la plej ĉefa kaj rimarkinda aranĝo, sufiĉe sukcese pasinta en kadroj de la festo - poezia konkurso "Liro-76".

Ideo pri tiu ĉi konkurso ne estis originala: nia movado jam havas sperton pri organizado de similaj aranĝoj ("Muzo" en Vilnius, "Parnaso" en Riga). Dekomence ankaŭ "Liro" estis planata kiel entrepreno de Miassa E-klubo. Tamen jam dum preparado al la konkurso evidentiĝis, ke almenaŭ duono de ĝiaj partoprenontoj ne estas miassanoj kaj kelkaj personoj - eĉ ne volgo-uralanoj. Tiel naskiĝis la ideo pri ĉiujara tutsovetia poezia konkurso "Liro". (Ni povas konsideri "Liron-76" kiel la unuan, dume ne plenfortan provon de la iniciatata entrepreno). Ĉefaj organizantoj de la konkurso, kiel pasintjare, pretas esti Poezia fako de SEJM kaj Miassa E-klubo. La loko kaj tempo de la konkurso restu, verŝajne, samaj kiel por "Liro-76".

Al kontraŭdirontoj pri nerealigeblo por ĉiuj dezirantoj ĉeesti la konkurson ni rememorigu pri foresta formo de partopreno (ankaŭ ne nova). En "Liro-76", ekzemple, tiu ĉi formo estis sukcese efektivigita pere de magnetofonaj surbendigoj.

Estus tre bone, se en ĉiu regiono de SEJM-aktivado fondiĝus poeziaj konkursoj, similaj al "Muzo" kaj "Parnaso", kiujn ni povus konsideri kiel unuajn etapojn de la tutsovetia konkurso. Saman celon havu belartaj konkursoj, organizotaj en kadroj de la tendaroj (ekzemple, la planata konkurso "Oriento-77" en OrSEJT-19).

Finante tiun ĉi mallongan prospekton de estonta tutsovetia poezia konkurso, mi volas anonci la rezultojn de "Liro-76".

I. ORIGINALA POEZIO - ne estis prezentita.

II. TRADUKITA POEZIO.

I-a loko: "Fabelo pri pluvo" de B.Aĥmadulina - tr. L.Novikova (Miass).

II-a loko: "Porinfanaj versaĵoj", aŭtoroj nekonataj - tr. L.Novikova.

III-a loko: "Ĉerko" de M.Ĝalil - tr. el la tatara lingvo F.Faizova (Satka, Ĉeljabinska reg.).
III. ORIGINALAJ KANTOTEKSTOJ.
I-a loko: "Novjara valso" - muziko kaj E-teksto de N.Cvileneva (Ufa).
II-a loko: "Ĉe la disiĝ'" - E-teksto de A.Aleksandrov (Ufa).
III-a loko: "Post nelonga tempo", "Oriento" - E-tekstoj de L.Novikova.
IV. TRADUKITAJ KANTOTEKSTOJ.
I-a loko: "Solvejg" de A.Blok - tr. L.Novikova, muziko de N.Dolganova (Sizranj).
II-a loko: "Maro" - tr. L.Novikova.
III-a lo..o: "Cindrulino" - tr. A.Aleksandrov.
V. PLENUMO DE VERSAĴOJ.
I-a loko: N.Davydok (Miass) - "Porinfanaj versaĵoj".
II-a loko: ..Dobrydina (Miass) - "Banas sin la luno" de S.Petöfi.
III-a loko: O.Dubinina (Ĉita) - "La monumento" de A.Puŝkin.
VI. PLENUMO DE KANTOJ.
I-a loko: N.Kirillova (Jelec, Lipecka reg.) - "Telefono".
II-a loko: V.Moŝkina (Miass) - "Oriento".
III-a loko: N.Kirillova - "Post nelonga tempo".
SPECIALAJ PREMIOJ:
de la ĵurio - por la melodio de "Solvejg" al N.Dolganova;
de la auskultantoj - por plenumo de kantoj de S.Jesenin al V.Moŝkina kaj A.Fomin (Miass).

L.Novikova, estrino de Poezia fako de SEJM.

PRI "TASKOJ DE LA SEZONO".

Mi dezirus turni min al la legantaro de la informilo kun jena demando: ĉu ofte vi rememoras pri io farenda, sed poste forgesas plenumi tiun taskon? Verŝajne ĉie en SEJM troviĝas unuopuloj vere bonintencaj, sed forgesemaj. Eble ankaŭ okazas, ke la funkciuloj aŭ eĉ tutaj SEJM-kluboj pretervidas konkretajn taskojn de agado.

Mi ne dubas, kaj tio estas tute certa, ke ne ĉiuj el la kluboj estas pretaj ion fari aŭ iom kontribui por antaŭenigo de la lingvo internacia. Sed estas tute certa ankaŭ tio, ke plimulto de la SEJM-kluboj kaj relative granda nombro de unuopuloj - subtenantoj de SEJM - volonte donos sian helpon, se ili estos ĝustatempe atentigitaj. Ĉu ne?

Interalie "Aktuale" de la antaŭnelongaj jaroj estis sufiĉe bona direktilo de niaj komunaj agoj. Bonvolu rememori la kampanjojn "Instancoj", "Materialojn de la 17-a Kongreso de VLKSM - por eksterlando!", tre utilajn artikolojn de S.Podkaminer "Kiel komenci porpacmovadan agadon?", de A.Gonĉarov "Iom pri metodoj propagandi Esperanton". Mi volas diri, ke tiama SEJM-Komitato starigis antaŭ la esperantistaro konkretajn taskojn de difinita periodo.

Male, ĉi-jara "Aktuale", laŭ mia vidpunkto, okupas pasivajn poziciojn kaj plejparte nur konstatas faktojn.

Ĉu ni ne bezonas rubrikon sub la titolo "Taskoj de la sezono"? Tiu rubriko aperu laŭ la ebleco en ĉiu numero de la informilo kaj konsistu el tute koncizaj konsiloj - kion fari en la koncerna periodo. La konsiloj povus esti rilataj aŭ al rutinaj taskoj, aŭ al specialaj laboroj en kadro de iu granda, lande planita, organizita kaj plenumenda klopodo. Tiu ĉi nova rubriko estus atente legata kaj observata de SEJM-klubanoj kaj de subtenantoj.

Mi ne estas kompetenta preskribi enhavon de la rubriko, sed ne dubas, ke ĝi estos tre utila.

Recenzu do la proponon, samideanoj - kamaradoj!

J.Kivajev, subtenanto de SEJM (Joŝkar-Ola).

KOMENTO DE LA REDAKTORO. La aŭtoro pravas, ke la enhavo de "A" estas nun pli konstata ol direkta. Sed la instrukciaj materialoj ne tute mankas en nia informilo, kion atestas ekzemple enkondukaj artikoloj de ĉi tiu numero. Laŭeble zorgante pri konstanta atentigo al plej gravaj demandoj de SEJM-agado, la redakcio praktikas mendadon de artikoloj pri certaj temoj fare de kompetentaj SEJM-funkciuloj. Kelkaj artikoloj, menditaj tiamaniere, aperis en tiu ĉi kaj antaŭaj numeroj. Tamen, sendepende de tiuj mendoj, la SEJM-respondeculoj pli aktive uzu niajn paĝojn por indiki al la esperantistaro necesajn paŝojn en respektivaj direktoj.

## VIGLA AGADO DE POLTAVANOJ

En nia Kulturpalaco de Sindikatoj unufoje en semajno funkcias E-klubo kaj unufoje E-kursoj. Kun helpo de estraro de Kulturpalaco ni fabrikis bonan afiŝon pri komenco de E-kursoj, kiu estis gluita en la urbo. Meze de februaro komencis funkcii 2 E-kursoj, kiujn ekgvidis mi kaj V.J.Noĉovkin.

Mi kaj miaj samideanoj multe prelegis en niaj laborlokoj. Por tio mi preparis specialan prelegon kaj tajpe multobligis. Estis organizita E-ekspozicio, kiu estis fotita kaj sendita fare de estraro de Kulturpalaco al sia respublika estraro kun raporto pri interna-cia laboro de Kulturpalaco.

Novaj komencantoj jam komencis korespondi kun eksterlandaj samideanoj. Ni ricevis el eksterlando multajn diversajn petojn sendi ion kaj ĉiujn kontentigis. Multon sendinte eksterlanden, ni ankaŭ multe ricevis de tie. Ni preparis malgrandan lokan novjaran E-renkontiĝon.

Jam duan jaron nia E-klubo gvidas korespondajn kursojn por eksterurbanoj. Nia monata laborplano estas presata kune kun la planoj de Kulturpalaco. Estas preparitaj por presado la membrobiletoj kaj la statuto de nia klubo. Mi sendis kelkajn artikolojn al eksterlandaj E-periodaĵoj kaj radio. Jam estas kelkaj publikaĵoj, ekzemple en Esperanto en Aŭstralio kaj bulgare en ĵurnalo "Borba".

Kelkvorte pri niaj malfacilaĵoj. Plej gravaj estas jenaj: mankas spertaj esperantistoj, mankas ejo. Bedaŭrinde ni ne havas apartan ejon, ĉar en Kulturpalaco mankas liberaj ĉambroj. Tial ofte eĉ du instruistoj laboras kun kursanoj en la sama ejo... Mi ne komprenas kial, sed multaj finintoj de E-kursoj malofte vizitas la klubon kaj malmulte laboras por progreso de la lingvo. Stranga situacio: en la urbo estas esperantistoj, sed ili tro malmulte faras por la E-klubo. En diversaj urboj kaj vilaĝoj de nia regiono ankaŭ loĝas esperantistoj eĉ spertaj, kiuj preskaŭ nenion faras por progreso de la lingvo en siaj loĝlokoj. Do ni havas multajn neuzitajn eblecojn kaj grandajn planojn, kiujn ni esperas realigi en baldaŭa estonto.

V.Grigorenko, prezidanto de Poltava E-klubo.

## INTERESA ARTIKOLO

Unu mia delonga pola leteramikino, sciante ke mi interesiĝas pri ĉiuj novaĵoj rilate al Esperanto, sendis al mi E-tradukon de fragmento el artikolo, kiu aperis la 23-an de decembro 1976 en la gazeto "La vivo de Varsovio". La aŭtoro de la artikolo estas profesoro Helmar Frank el FRG, eksperto en fako de instruteknologio. Jen kion li interalie skribas:

"Unu el la plej gravaj metodoj de nuntempa instruado estas komputeroj. Ekzistas aliaj iloj en edukado, sed ĝuste komputeroj permesas transdoni la plej grandan informprovizon kaj kontroli la scion de studentoj. Lige kun la ekzamenado de studentoj aperis problemoj,

Ĉar komputero prenas nur respondojn, kiuj estas programitaj en konvena kunmeto. Se temas pri tiel nomataj "lozaj eldiroj" de studentoj, ili ne estas akceptataj de komputero pro malfacilaĵoj, kiujn ĝi havas pri ilia semantika kompreno. Komputero ne povas tiam pritaksi, ĉu la respondo estas ĝusta. Malfacile estas antaŭvidi la manieron de eldiroj, kiuj povas esti diversaj en la sama enhavo. Ĉiuj naturaj lingvoj havas multe da neregulecoj, esceptoj, kaj tio kaŭzas al komputero grandajn malfacilaĵojn. Pro tio, prilaborante komputerprogramon, ni aplikis artefaritan lingvon, la internacian Esperanton, kiu rimarkinde taŭgas al tiu ĉi celo. Ĝi estas senigita de ĉiuj kaptiloj tiel oftaj en lingvo natura. Tia programo permesis al ni pli rapidan celatingon. Multaj homoj traktas Esperanton ironie, tamen vojaĝante tra la mondo mi konstatis amuzan aferon: homoj, kiuj normale ne traktas Esperanton serioze, lernas ĝin kaŝe, ĉar ĉi tiu lingvo havas multajn avantaĝojn. Por majstri ĝin sufiĉas 60 horoj de lernado, kaj duonjaro ebligas fluan parolon kaj legadon de plej malfacilaj tekstoj. Por atingi la samon en natura lingvo oni bezonas kelkajn jarojn. Krom tio, ekposedi Esperanton oni povas en ĉiu aĝo; naturan lingvon, precipe ĝian korektan prononcon (ekzemple en la angla aŭ la germana), nur en infanaĝo. Mia didakta modelo estas realigita nur pasintjare, sed jam permesis grandan progreson en la fako de instruteknologio. Universala enkonduko de Esperanto permesus pli grandan interŝanĝon de esploroj en internaciaj kontaktoj."

La artikolo vere revelacia por ni ĉiuj - resumas la tradukintino. Trafaj vortoj, ĉu ne?

V.Baniulaitis (Klaipeda).

## AL SOVETUNIAJ MATEMATIKISTOJ-ESPERANTISTOJ

Estimataj kolegoj kaj samideanoj!

Ni ĉiuj revas vidi Esperanton enkondukita en la sciencon. Sed... ĉu tio povas esti efektivigita sen niaj propraj penoj? Ja neniu alportos al ni, kvazaŭ sur iu telereto, "Esperanton en la scienco". Necesas niaj propraj agoj. Kaj jen estas tute konkreta propono por nia agado.

La Instituto de Kibernetika pedagogio (FRG) informis nin pri neceso baldaŭ ekhavi: 1) matematikajn fakvortojn en la IL; 2) matematikajn fakvortojn en la nacia lingvo; 3) matematikajn difinojn en la IL; 4) kibernetik-pedagogiajn fakvortojn en la nacia lingvo; 5) difinojn kibernetike pedagogiajn en la IL. La Instituto serĉas helpantojn por la kompilado (ĉirkaŭ 5x40 fakvortoj - laboro por ĉiu dum 2 - 4 tagoj).

Se vi konsentas tiel kunlabori (por bono de Esperanto!), bonvolu sciigi la prilaborotajn de vi punktojn al mi: 603009 Gorkij P-9, Rezervnaja 11 kv. 3. Ni informos la Instituton, kaj vi ricevos konkretan taskon..

V.P.Beŝkarev, sekretario de Gorkia grupo de IAdEM
(Internacia Asocio de Esperantistoj matematikistoj).

## ABONU "SCIENCAN MONDON"

Kiel ni scias, en 1976 la revuo "Scienca Mondo" komencis aperi ankaŭ en Esperanto. Tio estas grava evento en nia movado, kaj ni ne devas permesi, ke pro la eta eldonkvanto oni ĉesigu ĝian eldonon. (Similaj ekzemploj jam estis). Abonkvanto por Esperanto-revuoj ĝenerale ne estas granda ne nur pro kompare eta kvanto de esperantistoj, sed ankaŭ pro pasiveco al la abonado flanke de granda parto de ili. Do ni devas organizi kampanjon por subteno de "Scienca Mondo" almenaŭ per abono. Laŭ mia opinio, multaj, precipe aktivuloj kaj

kluboj, povus aboni po kelkajn ekzemplerojn de la revuo, ĉar post iom da tempo aperos novaj abonantoj el inter la kursfinontoj, kiuj ekvolos havi tutan kolekton de la revuo ekde la unua numero. Tiamaniere oni kaj pligrandigos la abonkvanton, kaj faros bonan servon al aliaj. Necesas aboni la revuon ankaŭ al urbaj bibliotekoj kaj laŭbezone al aliaj instancoj. Superfluajn kolektojn oni povus vendi dum tendaroj kaj aliaj renkontiĝoj.

La revuo aperas 4 fojojn jare, prezo 2 rub. Eblas aboni por 1976 kaj 1977. Abonojn akceptas Johannes Palu, 200016 Tallinn, do vostrebovanija, ĝis la 31-a de marto 1977.

Abonu mem kaj abonigu aliajn! Ne estu pasiva en la grava afero!

R.Keliuotis (Klaipeda).

MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO

LA REDAKCIO RICEVIS

protokolojn N$^{o}$ 1 - 8 de Gorkia IAdEM-grupo. La grupo fondiĝis 29.5.76., prezidanto - L.G.Kapustin. En la protokoloj temas pri proponoj de la grupo al la estraro de IAdEM, kontribuo al ties organo "Matematiko translimen", terminologia kunlaboro kun Instituto de Kibernetika Pedagogio en Paderborn, organizaj demandoj ktp.

"LA ARBO DE AMIKECO"

- tiel nomiĝis la vespero, organizita de Miassa E-klubo la 6-an de marto en Kulturpalaco de aŭtouzino. Ĉeestis ĉ. 100 personoj. La programo enhavis prelegon "Esperanto estas la lingvo por ĉiuj", koncerton el kantoj, versaĵoj kaj dancoj de diversaj popoloj, ekspozicion "Elstaraj homoj pri E.". La vespero, dediĉita al Internacia Virina tago, pasis kun granda sukceso.

NOVAJ KORESPONDAJ KURSOJ

estas fondataj de Krasnojarska E-klubo kun aprobo de la urba komitato de VLKSM kaj de la urba Kulturpalaco, sur kies bazo oficiale ekfunkcios la kursoj. Dezirantoj turnu sin por informoj laŭ la adreso: 660075 Krasnojarsk, ab. jaŝĉik 2420. E-klubo (Ŝapoĵnikov V.S., Pedĉenko N.I., Nasonova O.N.).

EL PRAKTIKO DE AGADO POR E-HISTORIO

La 27.2. - 4.3. en Krasnojarska E-klubo gastis veterano de E-movado Sergej Aleksandroviĉ Aleksejev. Dum sia restado en Krasnojarsk li havis kelkajn renkontiĝojn kun la kluba estraro, klubanaro kaj kursanoj. La veterano rakontis pri siaj renkontiĝoj kun famaj homoj (L.N.Tolstoj, N.K.Krupskaja k.a.) kaj kun eminentaj geesperantistoj: V.Jeroŝenko, A.Ŝarapova, E.Drezen kaj multaj aliaj. La rememoroj de S.A.Aleksejev estis surbendigitaj magnetofone fare de V.Nagiĉev, kiu gvidas historian laboron en la klubo. La vizito montriĝis utila por ambaŭ flankoj.

ESPLORANTE LA "JARLIBRON"

mi surprize ekvidis en la listo de subtenantoj novajn samideanojn, kiujn mi persone agitis. Do ankaŭ individua amika informado efikas!

V. Ĉernov (Kaluga).

DANKESPRIMO

Pro la gratuloj okaze de mia 70-jara datreveno, kore mi dankas al ĉiuj, kiuj salutis min.

A.Vebeliunas (Kaunas).

---

La informilo estas uzenda nur enlande! Fintajpita 20.3.77.
Ĉiujn materialojn por "A" sendu al: 121019 Moskvo d/v, Arolviĉu V.S.